



*EKO 2015-7 sendita el Novara 8 mar.*

*Al: Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne). Plie al la Komitato, Konsilianoj, regionaj komisionoj de UEA, ILEI-aktivuloj, TEJO-estraro, gazetaro, listoj kaj unuopuloj.*

## Junulara plankunsido en Italio kaj tra la mondo

La estraro de TEJO revenis post jaro kunveni denove en Novara, Italio. De la 6a ĝis la 8a de marto kunvenis 5 el la 7 estraranoj, plus TEJO-volontulo kaj observantoj de UEA kaj ILEI. La protokolado kaj taskmastrumado okazis pere de la interaktiva komputila programo Trello, tiel ke la protokolado, la registro de plenumitaj taskoj kaj la laborplano por la sekva periodo estis interaktive kaj real-tempe kreitaj. TEJO subvencipetis al la Eŭropa Volontula Servo (EVS), kaj pere de tio sukcesis ricevi monsumojn por alpreni du volontulojn por plenumi praktikajn taskojn por junaj esperantistoj. TEJO konstatis ke ekzistas komputile KATO-paro. KATO 1 estas dokument-stokejo, kaj KATO 2 skribkomunika programo - por eviti konfuzon, la dua eknomiĝas KATIMO. Okazas laboroj certigi la okazigon en 2015 de muzika konkurso, kun perreta prijuĝo malferma al ĉiu. Sekvis diskutoj pri kulturo kaj buĝetaj pretigoj, pri la pretigo de nova enketilo por la Landaj Sekcioj, realigataj pere de la reteja programo KODEJO. Decidite programo de reprezentiĝoj de TEJO en E-renkontiĝoj de nun ĝos la IJK.



Ĉiu kun komputilo:

de maldekstre:  
Stefan MacGill (UEA), Michael Boris Mandirola (vicprezidanto de TEJO), Radojica Pretrović (ILEI), Nico Huurman (kasisto de TEJO), Tomasz Szymula (Ĝenerala Sekretario de TEJO), Veronika Poór (TEJO).

La prezidanto de TEJO ne aperas en la bildo.

Plurfoje kaj diversteme oni aldonis aliajn junulojn per skajpo (el Brazilo, Skotlando) kaj estraranojn de UEA en Kanado, Meksikio kaj Ĉilio por duonhora interparolo.

Inter TEJO, UEA kaj ILEI okazis planado de AMO-seminario en IJF post tri semajnoj, kaj diskutoj pri ebloj de AMO en IJK en Wiesbaden (Germanio), kaj eble jarŝanĝe en JES en Eger (Hungario) kaj/aŭ en Sudorienta Eŭropo.

Inter TEJO kaj UEA, pri reformo de membro-kategorioj okazis instigoj, ke la koncerna komisiono en UEA aktiviĝu, tiel ke ĝis Lillo la Komitato de UEA havu voĉdoneblan proponon. Laborgrupo proponos kelkajn modifojn al la Interna Regularo de TEJO, tiun same la Komitato devas aprobi.

Inter TEJO kaj ILEI okazis intensaj diskutoj kaj interkonsentoj, i.a. pri edukaj programeroj en la IJK en 2016 en Wroclaw, Pollando, prezentiĝo de TEJO en ILEI-konferencoj, kaj la kunligo en 2017 de IJK kaj ILEI-konferenco en Afriko en du sinsekvaj semajnoj.

Lukasz Żebrowski (prezidanto de TEJO)  
Radojica Petrović (estrarano de ILEI)  
Stefan MacGill (vic-prezidanto de UEA)

## Pli da informoj pri AMO-10

En la vespero de la 1a de aprilo estas planate en la Internacia Junulara Festivalo (IJF) mallonga sinprezenta kaj varba sesio. AMO-seminarioj longos je 3 aŭ 4 horoj ĉiutage en la 2a de aprilo (postagmeze), la 3a (tempo-punkto decidota), la 5a (matene) kaj la 6a (matene). Fine iumaniere okazos pritaksa sesio, espereble kun komuna verkado de rekomendoj. Urĝas enmeti bazajn informojn en la retejo de IJF kaj verki informilon, kiun la organizantoj sendu al IJF-aliĝintoj, kun peto ke tiuj dezirantoj partopreni anoncu sin, tiel ke eblas reŝendi preparajn materialojn kaj interkonatiĝi kun seminariontoj kaj gvidontoj. Pliaj informoj disiris en komunikoj 5 kaj 6.

## Ĉilia renkontiĝo



La Landa Asocio en Ĉilio informas pri la okazigo de la 5a Somera Esperanto-Tendaro, en kiu partoprenis naŭ personoj. Ĝi okazis la 20an ĝis la 22an de februaro 2015, ĉe la Skolta Tendumejo Callejones. Naŭ personoj ŝajnas malgranda kvanto, sed por Ĉilio estas 'Amaso'!! En la kvin ĝisnunaj tendaroj partoprenis jam ĉ. 43 personoj.

